


LA JUNA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. ĜULD. AŬ EGALVALORO

LOUIS PASTEUR.

Napoleono kaj Pasteur: du famaj francoj, sed kiaj kontrastoj!

Sendube Napoleono estis granda, sed bedaŭrinde li ne uzis siajn kapablojn por feliĉigi la homaron. Kontraŭe, sekve de lia honoramo miloj da homoj mortis sur la bataalkampoj. Tamen lia nomo estas glorata kaj en ĉiuj lernejoj la infanoj lernas pri liaj heroaĵoj.

Kaj Pasteur, al kiu milionoj da homoj dankas sian vivon, kiuj konas lin? ...

Louis Pasteur naskiĝis en 1822 en Dôle. Lia patro estis eks-soldato de Napoleono kaj la simpla viro certe ne atendis, ke lia filo iam fariĝos unu el la plej famaj sciencistoj en la mondo.

La juna Pasteur montriĝis tre klera. Li ekstudis ĥemion.

Jam de jaroj oni konis la fermentadon, sed Pasteur eltrovis la procezon. Kiam oni per mikroskopo rigardas fermenteron, oni rimarkas amason da globformaj ĉeloj. La famkonata nederlandano v. Leeuwenhoek (nask. en 1632) jam priskribis tion. Ĉiuj vivantaj estaĵoj konsistas el tiaj ĉeloj. Ĉe fermento ĉiu ĉelo estas aparta planteto. Tiuj plantetoj vivas kaj, kiel aliaj vivantaj estaĵoj, ili bezonas nutraĵon kaj eligas ekskrementojn. Ili plimultiĝas per dividado: sur ĉelo aperas globeto, ĝi pligrandiĝas, liberigas sin de

la patrino ĉelo kaj ekvivas memstare. Kiam oni metas fermentajn ĉelojn en sukerhavantan fluidaĵon, ili nutras sin per la sukero kaj eligas alkoholon kaj karbonacidon. Fermentaj ĉeloj estas treege malgrandaj kaj troviĝas ĉie en la aero. Sekve, kiam ekstere staras barelo da suko el vinberoj, tiu fluidaĵo certe ekfermentos.

Pasteur do eltrovis, ke tiun fermentadon kaŭzas malgrandaj plantetoj. Sed ne tio estis la plej grava por la homaro. Li batalis ankaŭ kontraŭ aliaj ĉeloj, kiuj kaŭzas infektmalsanojn. Tiaj ĉeloj minacas ne nur la homojn, sed ankaŭ malgrandajn bestojn. En Francujo la silko-kulturado estas grava industrio. Jam de la 13-a jarcento oni tie bredas la silkoraŭpon. En la mezo de la 19-a jarcento la silkindustrio grave malpliigis, ĉar inter la raŭpoj regis infektmalsano. En tutaj francaj regionoj la loĝantaro malriĉiĝis. Oni petegis helpon de la registaro, sed ĝi estis senpova.

Fine ĝi petis la helpon de la juna sciencisto Pasteur. Dum kvin longaj jaroj ĉi tiu seninterrompe laboris por eltrovi la kaŭzon de la malsano kaj la metodon por antaŭrimedi ĝin. Per sia pena laboro li savis la silkindustrion ne nur en Francujo, sed ankaŭ por aliaj landoj.

Kaj li plu servis la homaron. Terura malsano, la antrakso, turmentis precipe la bovinojn kaj ŝafojn. Pasteur eltrovis la vekantojn (bastonformajn bakteriojn) kaj la kuracilon. La konata brito Jenner unue aplikis la vakcinadon kontraŭ variolo. Pasteur ekhavis la ideon en la sama maniero kontraŭbatali la antrakson. Ne facilaj estis la longedaŭraj serĉado kaj eksperimentado; akran kontraŭstaron de aliaj scienculoj li renkontis. Tamen fine li venkis kaj denove plenumis gravan servon al la homaro.

Poste li ekbatalis kontraŭ la terura malsano: la rabio. Kiam rabia hundo mordis homon, ĉi tiu estis kondamnita al morto. Terura estis la suferado de tia homo: li soifegis kaj ne povis trinki; teruraj spasmoj elĉerpis la korpon, ĝis fine venis la morto. Iam senesperaj gepatroj vokis Pasteur al sia infano, kiu suferis pro rabio. Terura spektaklo, sed Pasteur estis senpova. Li staris kontraŭ infektmalsano, ankoraŭ pli terura ol la antrakso. Ne eblis savi la infanon.

Tiam Pasteur senlace eklaboris por eltrovi kuracilon kontraŭ la mortiga malsano. Post multaj klopodoj li opiniis, ke li trovis la metodon, tamen ne jam aplikis ĝin al homo. En tiu tempo oni portis al li naŭ-jaran knabeton, kiu kuraĝe defendis siajn kamaradojn kontraŭ rabia hundo kaj fine eĉ sukcesis mortigi ĝin. Tamen la rabia besto mordis la malgrandan heroon diversloke.

Kion faru Pasteur? Li ne estis certa pri sia kuracilo. Li interkonsiliĝis kun diversaj kuracistoj.

„Injektu lin!” ili diris. „Vi scias, ke la knabo certe mortos, se vi faros nenion.”

Pasteur hezitis. Imagu, ke lia serumo ne taŭgas; ke ĝi kaŭzos al la infano eĉ pli fruan morton. La viktimo de mordo ja malsaniĝos nur poste, ne tuj post la mordo.

Tamen li donis la injekton. Sekvis horoj de streĉa atendo kaj tiam — la venko! La knabo resaniĝis.

Kelkajn jarojn poste en Parizo estis konstruata „La Instituto Pasteur”. La mono por ĝi estis grandparte kolektita de dankaj admirantoj de Pasteur. Poste li laboris tie kun stabo da sindonaj helpantoj. El ĉiuj landoj de la mondo venis scienculoj por lerni de li. En postaj jaroj oni konstruis similajn institutojn en aliaj landoj.

Nefacila estis la vivo de Pasteur; unu longa batalo, ne nur kontraŭ malsanoj, sed ankaŭ kontraŭ enviantaj sciencistoj. Tamen beno li estis por la homaro. Kiam li mortis je la 28-a de septembro 1895, li lasis bazon, sur kiu aliaj povis daŭrigi la konstruadon.

Pasteur estis franco: multe li amis sian patrujon; li laboris tamen por la tuta homaro. — Koch estis fama germana kuracisto, kiu sekvis Pasteur. Li i.a. malkovris la bakteriojn, kiuj kaŭzas la ĥole-ron kaj tuberkulozon. — Jenner, kiu unue aplikis vakcinadon kontraŭ la variolo, estis brito.

La tri landoj povas fieri pri tiaj filoj, kiuj savis kaj savos milio- nojn da homaj vivoj. Tion faris la plej noblaj filoj de tiuj popoloj.

Kaj la popoloj mem?

Ili buĉigis milionojn de siaj infanoj en abomeninda mond- milito

Ĉu estas io, kion vi ege ŝatus fari, antaŭ ol vi mortos?

(Responde al „Propono” en n-ro 138).

Tiu ŝajne ŝerca demando metas min antaŭ du gravajn proble- mojn. Unue la problemo de la morto. Ĝi estas grava enigmo, seri- oza mistero. Laŭ graveco ĝi estas egala al ĝia kontraŭo: nia estiĝo. Fakte ne temas pri kontraŭo, ĉar estiĝo kaj malapero estas du flankoj de la sama afero: la Vivo.

Dum pli-malpli longa periodo ni vivas kaj poste ni devos adiaŭi. Kion mi ege ŝatus fari, antaŭ ol mi flustros la lastan adiaŭon?

Multon. Pli precize dirite: mi volas disvolvi ĉiujn miajn kapablojn. Tion mi opinias la celo de mia estado ĉi tie. De la infaneco mi klopodas plenumi ĉiajn taskojn, utilajn kaj plezurajn, promonajn kaj honorajn. Interna forto pelas min al tio. Ĉiam mi konstatas, ke miaj kapabloj ne egalas miajn dezirojn. Aliaj estaĵoj superas min laŭ talento, forto aŭ volo. La klimato ne favoras min, la sano ŝanceliĝas, la volo malstreĉas. Tamen mi baraktas. Pri iom da forto mi disponas, pri intelekto ordinara; bonvola mi estas, kelkfoje. Tiel mi plenumas taskojn, ĝuas, suferas, perdas, triumfas, trompas, helpas, blasfemas, preĝas kaj spiras. Koncize: mi vivas. Mi aplikas kaj uzas miajn kapablojn.

Kion mi ege deziras fari, antaŭ ol mi mortos?

Antaŭ ol morti mi deziras **vivi**. Ne vegetadi, ŝimi, putriĝi.

Mi ŝategas la vivon, inkluzive de la zorgoj, malsanoj, sukcesoj, seniluziigoj, amuzoj, amoj, trompoj kaj hipokritaĵoj.

Ripete: antaŭ ol morti mi ege ŝatas vivi.

Kano.

Noto de la red.: Ĉu pro la ferioj envenis tiom malmulte da verkaĵoj? La ferioj nun pasis, do ĉu ni povos atendi pli da aktiveco? Jen do nova „propono”: ni petas vin sendi vian opinion pri: „**La radio**”. La plej bona verkinto ricevos premion. Oni sendu la verkaĵojn al T.J.O.-Centro, antaŭ la 1-a de novembro.

„Viroj — inoj”.

En la februara numero de „La Juna Vivo” mi legis kun intereso la ambaŭflankajn „riproĉojn” de Kon Walsh kaj Win Kay. Estis mia intenco respondi pri la artikoloj, sed fine mi pensis: „Vortoj!! Kion ili utilas?? Por tio mia laborakirita mono estas tro valora...”. Krome mi imagis, ke certe la „tutmonda inaro” leviĝos kontraŭ tiuj vortoj, pro kio **mia** opinio tute ne estus necesa kaj grava. Tial mi estis surprizita, legante en la sekvinta numero nur unu respondon, kaj ĉi tiu estis kontraŭ **ni**, la knabinoj! Tio ŝajnis al mi hontinda por ni kaj mi bedaŭris, ke mi ne skribis.

Mi ne deziras kaŝi tion, kio bedaŭrinde eble estas vera rilate la modernan tipon de la inaro, sed — ĉu ni knabinoj ne rajtas riproĉi la samon al la viroj? Kie estas la vivkamaradoj? Kie estas la viroj, kiuj atentis kaj serĉas ne unue la eksteran belecon de knabino? Kie estas la viroj, kiuj alparolas knabinon nur por serioze interparoli kun ŝi? K.t.p.!

Jam kelkfoje mi legis en la gazeto kun miro kaj eta malestimo, kiom da leteroj, edziĝproponoj, ricevas la tiel nomataj belecre-

ĝinoj aŭ la knabino, kiu heredis milionojn. Kion multaj — eble eĉ la plej multaj — viroj do ŝatas kaj estimas ĉe knabino? Ĉu ili demandas, kio estas malantaŭ la beleco kaj kio restos, kiam ĝi estas forvelkinta?

Krome mi memoras interparolon de du junaj viroj: „Tiu, kies edzino ne daŭre devas tremi pro li (t.e. ke ŝi daŭre timu, ke li povos trompi ŝin), ne estas viro!”

Tiel oni povus daŭrigi. Sed mi volas menciigi nur, ke ankaŭ la knabinoj seniluziigis kaj ke ni kiel vivkamaradon ne deziras tian modernan virtipon (se ni cetere serĉas viron).

Cetere pri esperantistoj mi havas pli bonan opinion, kvankam ĉi tiun impreson mi ricevis ĝis nun nur el leteroj. Sed ili estas kredindaj.

Tial ankaŭ la riproĉoj de Kon Walsh, ke la esperantistinoj en kongresoj kaj kunvenoj reprezentas „senagan, sensentan, senutilan kaj sensacian inaron”, ŝajnas al mi pli ŝercaj ol seriozaj. Ĉu la fakto, ke ili fariĝis esperantistinoj, ne pravas, ke ili estas serioze pensemaj kaj partoprenas la problemojn de la mondo kaj deziras kunlabori por solvi ilin?

Hild. Feick (19-j.), Heppenheim, Germanujo.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Jam pasis nia kunveno en Versajlo (Versailles). Kiom kara rememoro! Neniam ni forgesos tiun belegan semajnon kaj ĉiam ni restos dankaj al niaj francaj geamikoj, kiuj tiom sindone laboris! Al f-ino Royer, la prizorgantino de la francaj Esperanto-elsendoj, kiuj tiom bonege propagandis, al s-ro Omont, la jam griza, sed tiom vigla organizanto, al s-ro Clopeau, kiu malgraŭ siaj multaj zorgoj pri la loĝado kaj materialo tamen ĉiam gajaspektis, al nia nelacigebla franca ĉesperanto „Bizeto”, al s-ino Haudebine, nia fidela gvidantino, kies „Prrrr!”-krio tiom ofte revokis nin al la ordo, al f-inoj Minault kaj Brinaud, al Jan Savoy, ho, ne eble rememori ĉies nomojn: al ĉiuj multan dankon! Internacia familio ni estis, sub via gvidado: proksimume 200 geanoj el Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Svedujo, Svisujo.

Kiom ni ĝuis en unu semajno! Bonega estis la loĝado. Belegaj la ĉirkaŭaĵoj: la luksega kastelo, la admirinda parko. Interesa estis la oficiala akcepto en la belega pariza urbdomo. Kiom da belaĵoj

ni vidis dum la ekskursoj: la „Nôtre Dame”, „Sacré Coeur”, „Hôtel des Invalides”, „Arc de Triomphe”, ne eble priskribi ĉion. Kiu forgesos la imponan vidaĵon de la supro de Eifelturo? Interfratigaj estis la vesperaj programoj. Ankaŭ la komuna kantado kaj popol-dancado! La lum- kaj akvofestoj tute ne estas priskribeblaj: fabelaj ili estis, nekredeble belaj! Bonega propagando estis la radio-elsendoj de la diversaj programeroj, de la opinioj de la diverslandaj grupestroj k.t.p. Kiom festa estis la lasta tagmanĝo, en kiu partoprenis la vicurbestro, s-ro Cadoret, kaj la direktoro de la „Ecole Normale”. (Esperu ni, ke la oficialuloj ricevis bonan impreson pri nia movado, por ke estiĝu vigla junularmovado en Versajlo!). Ho, la impresoj kirliĝas en nia memoro.

Ja ankaŭ estis la pli seriozaj momentoj. Laborkunsido de TJO-anoj. Diskutoj, i.a. pri „La Juna Vivo”, inter la pli aĝaj gejunuloj. Delegitoj vizitis la tombon de s-ro Chilard, la iniciatinto de nia kunveno. Jam de jaroj s-ro Chilard planis organizi internacian junularrenkontiĝon. Nur ĉi-jare, pere de T.J.O., lia deziro efektivigis, sed tragike, li ne ĝisvivis la kunvenon. Por esprimi la dankon de la tutmonda junularo la delegitaro metis simplan bronзан palm-branĉon kun surskribo sur lian tombon.

Kaj nun ni ĉiuj revenis al niaj hejmoj, pli riĉaj je spertoj, kun nova entuziasmo, kiun ni portu en la mondon!

Ĝis revido en la venonta T.J.O.-Kunveno! Ĉu en Germanujo? Aŭ ĉu en Danujo? Ni atendu la informojn!


N. K.

Ricevitaj donacoj: s-ro E. (Francujo): 500 fr; s-ro J.: 750 fr, s-ro S.: 500 fr; S-ro T.: 750 fr; f-ino H.: 200 fr; f-ino B.: 200 fr; f-ino B.: 200 fr. (ĉiuj en Anglujo). Entute oni donacis por la kunveno 23.980 fr.

Peto. Vi scias, ke Radio-Parizo (31.60 m) ĉiutage elsendas Esperanto-programon (de kvarono post la 18-a ĝis duono post la 18-a h). Ĉu vi scias ankaŭ, ke la trian ĵaŭdon de ĉiu monato tiu programo estas speciale junulara? Vi multe povas helpi, sendante materialon por tiuj elsendoj, por la leterkesto, aŭ interesajn spertojn, ŝercaĵojn, teatraĵetojn k.t.p. Ĉiukaze sendu viajn kritikojn kaj dezirojn. Adr.: f-ino H. Royer, Radiodiffusion Française, 118 Champs Elysées, Paris VIII, Francujo. Via helpo estas grava!

Peto: Ekzistas bona ŝanco, ke la Germana Fervojo enkondukos Esperanton por ĉiuj siaj oficistoj. La ĝenerala direktoro, d-ro Busch simpatias la planon, sed li bezonas skribajn instigojn el la eksterlando. Oni ne prokrastu skribi al: d-ro Busch, Hauptverwaltung der Deutschen Reichsbahn, Offenbach am Main, Bieberer Str. 59.

Kiu sendas 1 guld. (5 resp. kup.) al la TJO-Libro-Servo, Voorhaven 80, Edam, Ned., ricevos 10 diversajn Esperanto-gazetojn.



IJK-Rubriko. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederl. — Centra Informejo de IJK: Einar Dahl, Uddevalla.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj stariĝis!

Karaj Gekolegoj,

Ni nun povas fieri, ke ni havas nian internacian asocion. Ĝi ankoraŭ ne estas forta, sed ĝi stariĝis. La bazo estas la landaj fakaj asocioj (aŭ sekcioj). De ili venas la komitatanoj kaj el la komitatanoj venas la estraro.

En Bournemouth la provizora komitato de IJK dufoje kunvenis kaj elektis la estraron jene: prezidantino: f-ino V. C. Nixon (Britujo); sekretario-kasisto: s-ro Einar Dahl (Svedujo); konsilantoj: f-ino Jeanne Dedieu (Francujo), s-ro Korte (Nederlando). La tria konsilanta loko restas libera, ĝis alia landa societo anoncos sin. La liston de la ge-reprezentantoj ni reviziis, ĉar ni bezonas agemajn, fidindajn ge-kolegojn, kiuj klopodos stariĝi instruistajn grupojn kaj sin okupas pri ĉiuj aferoj en la lerneja kampo. Tiun liston kaj la akceptitan konstitucion ni publikigos kiel eble plej baldaŭ.

Profesoro W. E. Collinson, M. A. Ph. D. (Liverpool Universitato) bonvenigis nian fak-konferencon en Bournemouth kaj s-ro Goodes (Britujo) prezidis. Dum niaj du publikaj kunvenoj (marde, la 9-an, kun 105 ge-ĉeestantoj kaj vendrede, la 12-an, kun 80 ge-ĉeestantoj) ni aŭskultis la raporton de la Centra Oficejo (s-ro Dahl) kaj individuajn raportojn de f-ino Nixon (Britujo), f-ino Dedieu (Francujo), s-ro Tadros Megalli (Egiptujo) kaj s-ro Villki (Finnlando). Grava afero estis la kunfandiĝo ek de septembro de „Juna Espero”, la brita lerneja gazeto, kun la lerneja sekcio de „La Juna Vivo”. Ni esperas, ke ĉi tiu unika gazeto servos la tutmondan lernejaron.

En la fino de la konferenco ni akceptis rezolucion kaj ni petas al niaj ge-kolegoj en ĉiuj landoj, ke ili sendu ĝin laŭeble al edukaj gazetoj kaj al instruistaj sindikatoj.

Rezolucio.

Ĉi tiu Konferenco de 110 geinstruistoj el 16 landoj konstatas la valoron de Esperanto por interrilatoj inter diverslandanoj kaj rekomendas al ĉiuj instruistaj organizaĵoj, ke ili subtenu kaj akcelu la uzadon de la lingvo inter siaj anoj kaj en la lernejoj.

Kiel mi diris en Bournemouth, tiuj ge-kolegoj, kiuj instruas Esperanton en lernejoj, estas la plej grava parto de nia movado, pli grava ol prezidanto aŭ aliaj oficistoj, sed ni ĉiuj fortiĝas pere de kunagado kaj la inspiro, kiun donas kunlaborado. **Mi alvokas al ĉiuj Esperantistoj-ge-instruistoj, ke ili aliĝu al IIK pere de landaj grupoj kaj tiel montru al la ekstera mondo, kion ni povas kontribui al la klereco kaj pliboniĝo de nia nuntempa mondo.**

Violet C. Nixon, prezidantino.

Statistiko Bournemouth-kunvenoj: Anglujo: 48, Aŭstrujo: 1, Belgujo: 1, Danujo: 3, Egiptujo: 1, Finnlando: 1, Francujo: 31, Germanujo: 2, Irlando: 1, Islando: 1, Italujo: 1, Kimrujo: 1, Nederlando: 3, Nov-Zelando: 1, Skotlando: 4, Svedujo: 10.

Raporto pri la instruistaj kunsidoj dum la I.J.K. en Versajlo aperos en la venonta n-ro.

Karaj Lernejanoj,

Precipe mi nun parolas al la britaj junuloj. Ĝis nun multaj el vi ricevis la gazetojn „Juna Espero” kaj „La Juna Vivo”. Ekde septembro tiuj **du** gazetoj fariĝis **unu**. Eble multaj el vi bedaŭras tion, ĉar J. E. estis landa gazeto kaj do pli intima ol JV, kiu iras al ĉiuj landoj de la mondo. Sed — vi havos la avantaĝon, ke vi bezonas pagi nur unu gazeton, kaj en tiu vi trovos la enhavon de du gazetoj, ĉar s-ro Slade, la red. de J. E. helpas ankaŭ en la redaktado de LJV. Plue vi trovos multajn korespondadresojn, el ĉiuj landoj, kaj — via tiom ŝatata rubriko pri enigmoj kaj konkursoj restos! Per ĝi LJV certe fariĝos multe pli interesa por **ĉiuj** legantoj! Jen do avantaĝoj de la nova aranĝo.

Sed ni havas ankaŭ peton: Ĉu vi ĉiuj helpos fari nian komunan lernejan gazeton interesa? Eble vi demandas: „Kiel **mi** povus fari tion?”

Nu, tute simple: 1. Skribu, kian enhavon vi deziras; kio plaĉas al vi kaj kio ne plaĉas al vi. (Tion ja **ĉiu** povas fari!). 2. Regule solvu enigmojn kaj partoprenu la konkursojn. 3. Kiu tion povas, verku simplajn verkaĵojn. Ne timu! Se vi faras erarojn, ni korektos ilin! Se vi **mem** kunlaboras, en kiu ajn maniero (ankaŭ la varbado de novaj abonantoj estas grava!), vi ĉiam pli sentos: „La Juna Vivo” estas nia **propra** gazeto. Per ĝi mi trovas amikojn en la tuta mondo!”

Ĉu vi promesas vian helpon?

Dankon!

La britoj ankaŭ nun povas sendi siajn kontribuadojn al la konata adreso de s-ro Slade, la aliaj al la red. de LJV en TJO-Centro, West-Graftdijk, Nederlando. Leterojn, kiuj rilatas la konkursojn, oni **ĉiam** sendu al la adreso, kiu troviĝas sub la koncerna konkurso. Bonvolu bone atenti la konkurs-regulojn!

N. K.

NIA VERKILO.

Skribu multajn frazojn, mi petas!

1.

Estas vespero, ĉar

La knabino ŝtaras antaŭ la pordo.

Ŝi diras al la patrino: „.....”

La patrino respondas: „.....”



2.

Faru frazojn per la vortoj:

knabo, kuracisto, lito, tablo, fruktoj.

Kaj respondu:

Ĉu la kuracisto donas limonadon?

Ĉu la knabo estas feliĉa?

Kiam la knabo estos feliĉa?



3.

frukto — folioj — arbo

arbaro??



4.

La skatolo estas

En la skatolo

La nomo de la skatolo estas

Mia patro poŝo.

Mario ne havas

Sur la skatolo

plena — malplena?



LA LIBERTEMPO.

Karlo: Mi ĝojas vidi vin denove, Petro.

Petro: Ha, Karlo! Ĉu vi ĝuis vian libertempon? Vi vizitis vian onklon, ĉu ne?

Karlo: Jes. Li havas grandan farmbienon apud la maro.
 Petro: Do vi vidis la kamparon kaj ankaŭ la maron!
 Karlo: Kompreneble!
 Petro: Kion vi faris ĉe la farmbieno?
 Karlo: Ho, mi helpis mian onklinon, kiam ŝi faris fromaĝon kaj buteron el la lakto.
 Petro: Tio estas interesa okupo.
 Karlo: Jes, kaj mi portis manĝaĵojn al la kokinoj kaj la porkoj!
 Petro: Ĉu vi vizitis la marbordon?
 Karlo: Jes, mi estis tie. Mi grimpis super la rokoj kaj kaptis kelkajn malgrandajn bestojn, kiuj loĝas en la maro.
 Petro: Vi vadis, ĉu ne?
 Karlo: Ho, jes! Kaj mi ankaŭ naĝis.
 Petro: Vi estas tre sperta!
 Karlo: Unu tagon mi vizitis la havenon apud la vilaĝo. Tie mi vidis multajn boatojn.
 Petro: Ĉu vi estis en boato?
 Karlo: Jes, mia kuzo remis, do mi iris kun li. Mi estis ankaŭ en velŝipo.
 Petro: Vi ne remis, ĉu?
 Karlo: Ne. Mia kuzo diris, ke mi estas tro juna por remi sur la maro.
 Petro: Kion vi faris dum la vesperoj?
 Karlo: Mi kolektis ovojn kaj faris aliajn malgrandajn taskojn.
 Petro: Ĉu vi estis laca?
 Karlo: Jes, ofte dum la vespermanĝo mi preskaŭ dormis!
 Petro: Baldaŭ mi libertempos, sed mi loĝos en urbo.
 Karlo: Mi esperas, ke vi havos tre feliĉan libertempon.
 Petro: Dankon! Mi vidos vin, kiam mi revenos. Ĝis la revido!
 Karlo: Ĝis la!

C. M. G.

Karaj Geamikoj,

Ĉi tiun fojon ni volas rakonti pli pri nia komunumo.

Edam konsistas el du partoj: La urbo Edamo kaj la vilaĝo Volendam. Strange estas, ke la urbo havas 3000 enloĝantojn kaj la vilaĝo 8000.

Se fremduloj vizitas nian urbon, ili ĉiam vizitas ankaŭ la parton Volendam.

Volendamo estas mondfama pro la belaj kostumoj, kiujn oni povas vidi tie. Precipe dimanĉe.

La virinoj vestas sin per belaj, koloraj jupoj kaj ili surhavas pintajn kufojn. Ili ne portas ŝuojn, sed duonpantoflojn, sen kal-kanumoj, aŭ lignajn ŝuojn.

En Volendam oni en tre stranga maniero pendigas la lavitajn vestojn. Ĉie oni uzas por tiu laboro lignajn pinĉilojn. Ne en Volendam. Tie oni prenas du ŝnurojn. Oni turnas unu ĉirkaŭ la alian. Tiam oni prenas la lavitan veston en la maldekstra mano, turnas per la dekstra mano unu ŝnuron returnen kaj metas pinton de la vesto en la truon. Post tio oni liberigas la du ŝnurojn kaj la vesto pendas. Tre simple, ĉu ne?

Ankaŭ en Edamo oni multe povas vidi. Belegajn malnovajn konstruaĵojn, belan turon kaj tre belan preĝejon kun malnovaj fenestroj.

Tro multe por rakonti. Oni mem rigardu kaj vizitu nian lernejon. Ĉiu ĉiam estos bonvena!

Lernantoj de la elementa lernejo en Edamo, Nederlando.

La Marmoto (alpa rodulo).¹⁾



Iun tagon mia avino aŭdis terurajn fajfojn. Ili venis de sub amaso de tabuloj. Ŝi timegis kaj vokis mian patron. Unu post la alia li prenis la tabulojn. Najbaro atendis kun fusilo en la mano.

Subite aperis pinto de nazego. Tuj la najbaro ekpafis. Li certe bone trafis, ĉar la nazego estis tute

difektita. Tiam ni vidis, ke la besto estas marmoto.

Ni buĉis ĝin kaj manĝis ĝin.

Sed de kie ĝi venis? Nur pli poste ni sciis, ke ĉasisto ĝin kaptis, sed ke ĝi sukcesis forkuri.

Gilbert Mollard, 11-j.

(Gilbert, ĉu ne krude mortigi ne danĝeran beston, kiu ne povas defendi sin? Red.).

¹⁾ Verkita laŭ la Freinet-metodo.

Konata kometo.

Instruistino: Kio estas kometo?

Anjo: Stelo kun vosto.

Instruistino: Bone! Kaj ĉu vi povas diri la nomon de iu kometo?

Anjo: Miki-muso, fraŭlino!

Ŝtelado aŭ sorĉado.

La instruisto klarigis, kio estas ŝtelado: Do, knaboj, ŝtelo estas ekzemple, se Paŭlo prenas la kajeron de Johano. — Hé, Jozefo! Ĉu denove vi ne atentis?

Jozefo: Ho jes, sinjoro instruisto, mi atentis.

Instruisto: Nu, se vi atentis, tiam diru al mi: kio mi estus, se mi prenis el via poŝo dek ŝilingojn?

Jozefo: Tiam vi, sinjoro instruisto, estus sorĉisto!

La zorgema filo.

Patro (kolere al sia filo): Kiom ofte mi jam diris al vi, ke vi ne rajtas uzi miajn vestojn! Kaj nun vi portas mian pluvmantelon!

Filo: Jes patro, sed nur por ŝirmi vian festveston kontraŭ la pluvo!

Oni demandis al la fama angla verkisto Shaw (elparolu So): „Ĉu la infanoj ne ĝenas vin, kiam ili ploras?”

„Tute ne, mi eĉ ŝatas ilin tiam!”

„Kial?”

„Ĉar tiam oni forportas ilin el la ĉambro.”

La Universala Kongreso.

En ĉi tiu jaro la Universala Kongreso okazis en Britujo kaj pro tio estas oportune citi kelkajn vortojn de d-ro Zamenhof, kiujn li parolis, kiam por la unua fojo okazis la U.K. en tiu lando.

Li klarigis, kial Esperantistoj el la tuta mondo tiel kunvenas ĉiujare: „..... ni faras manifestacion kaj propagandon por la esperantismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la esperantismo havas por la tuta homaro, pro tiu komune homa celo, kiu nin, aktivajn esperantistojn, altiras al Esperanto: ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la esperantismo en si havas.”

KONKURS-RUBRIKO.

De nun ni alternigos enigmojn kaj konkursojn tiel, ke en ĉiu numero vi trovos ion por cerbumigi vin.

Dum la kvin unuaj numeroj de la pasinta jaro sepdek tri (73) ensendis provojn pri enigmoj kaj tradukadon de legomaterialo. Ne estas facile ordigi la nomojn, ĉar iuj komencis malfrue, do mi kalkulis la poentojn, kiujn gajnis la pli-malpli konstantaj provantoj kaj dividis per la nombro da ensendoj. Sekvas la nomoj kaj poentoj de la unua kvinono: **C. Parker (17), J. Boffey (16), E. Bates (15), G. Dudley, R. Pender (14), M. Aldridge, S. Cummins, O. Evans, D. Kilgour, S. Wildman (13), P. Derry, M. Lemmon, T. Pender, M. Walters, A. Wilson (12).**

Kvankam ni ne proponas premiojn por enigmoj, mi aljuĝas unu al **C. Parker**, ne nur ĉar ŝi superis la ceterajn pri poentoj, sed ankaŭ pro konstanteco: ŝi ne preterlasis eĉ unu ensendon.

T. K. Slade.

(La supraj vortoj estas destinitaj por la legintoj de „Juna Espero”. De nun la konkurs- kaj enigmo-rubrikoj aperos en LJ.V, do ĉiuj lernantoj povos partopreni ilin. La novuloj bone atentu la regulojn!)

Konkurs-reguloj: Skribu klare: 1. vian nomon, 2. vian naskiĝdaton, 3. dum kiom da tempo vi studas Esperanton, 4. vian lernejon, 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

Premioj: La Brita Esperanto-Asocio kompleze provizas tri premiojn: unu, ĝis 2 ŝ. 6 d., por la unuagrada, kaj 2-3 ŝ. por la dua- kaj triagrada konkursoj. — Premiogajnantoj el Britujo povas elekti ion ĝis tiuj valoroj el la katalogo de B.E.A. kaj faru tion baldaŭ post la anonco pri sukceso. Tiuj el aliaj landoj povas elekti el listo presigota en la novembro numero.

I-a konkurso (ĝis unujara lernado).

1. Bordo, pordo, fordo, kordo. 2. Kato, kafo, kano, kapo.

Ekzameni ĉi tiujn vortojn. En „bordo” mi ŝanĝis la unuan literon, kaj en „kato” la 3-an. Faru same novajn vortojn el:

1. Mano, Rato, Besto. — 2. Paco, Rido, Salo.

Ensendu vian provon antaŭ la 10-a de oktobro al: f-ino Mooy, 96, Mansell Road, Birmingham 10, Britujo.

II-agrada konkurso (ĝis dujara lernado).

El la sekvantaj 23 silaboj faru dek vortojn kun ĉi tiuj signifoj: 1. speco de frukto, al kiu apartenas la frambo; 2. parenco; 3. adjektivo; 4. kortbirdo, kiu naĝas; 5. floro; 6. manĝilo; 7. la malo de post; 8. manvesto; 9. metalo; 10. parenco.

La komenclitroj faras Esperantan saluton en du vortoj. — La silaboj estas: a-an-be-ci-ĉi-gan-lo-lo-na-nar-ne-no-o-onk-ro-ro-so-so-taŭ-to-tran-va-vo.

Ensendu vian provon antaŭ la 10-a de oktobro al s-ro Moir, 44 Francis Str., Fulwell, Sunderland, Britujo.

III-agrada konkurso (por ĉiuj): Faru verkaĵon el ĉirkaŭ 200 vortoj pri „Interesa Loko”. — Ensendu vian provon antaŭ la 10-a de oktobro al ges-roj Anwell, 141 Ennerdale Road, Walker, Newcastle-on-Tyne, Britujo.

Pri la „pensosporto” en la antaŭa numero:

Petro pravis: Li havis tri pantranĉaĵojn, $3 \cdot 3 = 9$ pecoj. Li formangis 5 pecojn, do al la sinjoro li donis 4 pecojn. Andreo havis 2 pantranĉaĵojn, $2 \cdot 3 = 6$ pecoj. Li formangis 5 pecojn, do de li la sinjoro ricevis unu pecon.

POSTMARK-RUBRIKO (por ok- ĝis okdek-jaraj gejunuloj).

Karaj geamikoj, ĉi tiu nova rubriko en nia gazeto povos sukcesi, sed vi ĉiuj helpu.

Mi proponas jenon: Kiu havas tro multe da poŝtmarkoj de sia propra lando, sendu ilin al la libro-servo de TJO; kun respond-kupono. Li (aŭ ŝi) aldonu letereton, en kiu ekzemple staras: „Mi sendas al vi poŝtmarkojn el kaj volonte ricevos poŝtmarkojn el”

Se la libro-servo posedas la deziritajn poŝtmarkojn, ĝi tuj sendos ilin. Kelkfoje vi iom devos atendi. Sed paciencu, la libro-servo certe respondos.

Kiu povos ion rakonti pri poŝtmarkoj, faru tion. Ni atendos viajn leterojn. Ju pli multe, des pli bone! Por la plej bela letero ni donacos 100 nederlandajn poŝtmarkojn.

Libro-Servo TJO, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

SKOLTA RUBRIKO.



Kanado: Dum la kanada skolta semajno la geskoltoj faris kaj kolektis ludilojn, kiujn ili donis al UNESCO (edukema sekcio de la unuiĝintaj nacioj). Tiujn ludilojn oni disdonis al francaj kriplaj infanoj kaj al militorfoj. La francaj skoltoj estu dankaj al siaj kanadaj fratoj pro la plezuro, kiun ĉi tiuj faris al la plej malfeliĉaj inter la francaj infanoj.

Sudorienta Afriko: Vojaĝintoj skribis al la centra oficejo por esprimi sian dankon al afrikaj skoltoj, kiuj helpis ilin.

„Antaŭe oni rakontis al ni, ke helpo kostas proksimume kvar funtojn, kiam aŭtomobilo veturis en marĉon.

Nia aŭtomobilo bedaŭrinde venis en marĉon kaj ni kredis, ke la homoj, kiuj helpis nin, petos monon. Sed kiam mi volis doni monon al ili, ili diris: „Sinjorino, ni ne deziras, ke vi donu al ni monon. Ni estas skoltoj.”

Tiu renkonto okazis apud la urbeto, kie Baden-Powell mortis. Certe li estus kontenta, se li vivus ankoraŭ kaj aŭdus pri tia diro.

Zigzaganta Hipopotamo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino A. Kaagman, Voorhaven 80, Edam, Nederlando).



Jen la nova estraro: s-ro Geurts: prezidanto kaj provizora kasisto (adreso Voorhaven 80, Edam, ĝironumero 537168), sekretariino: f-ino A. Kaagman (atentu la adreson supre); asessoroj: s-roj Kryt, Blauw, Slagt, f-inoj Beekman kaj Veldhuyzen. — Detala raporto pri la laborkunsido en Versajlo aperos en „Peranto”, kiun ni eldonos meze de

septembro. Interesatoj nepre petu ekzempleron al la sekretariino.

Donacoj por nia „trezorejo”: s-ro S. en M.: ŝ. 1; s-ro S. en N.: ŝ. 5; s-ro A. W. M. en L.: ŝ. 3; f-ino G. S. en B.: ŝ. 1. (ĉiuj en Anglujo).

Dekstre:

Nia franca ĉefperanto: Roger Bizet, Wierre-au-Bois, P. d. C.

Kiuj ĉeestis en Versajlo certe memoras lin!

Dum la IJK en Versajlo estas faritaj tre multe da fotoj. Ĉu ne estus interese fari per ili memorigan albumon? Ĝi povus rondiri laŭ la partoprenintoj, kaj esti montrata en venonta IJK. Tiu-ĉele ni petas, ke la farintoj de fotoj sendu la taŭgajn ekzemplerojn (kun klarigaj subskriboj) al s-ro A. Blauw, Dijk 11, Obdam, Nederlando, kiu preta kompili kaj cirkuligi la albumon.



KORISPODADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Aŭstrio: Gesamideanoj, vizitantoj la mondfaman pilgrimejon Maria Zell, nepre vizitu en gastejo Hochschwab, inter Thörl kaj Graz. s-anon Alois Postl.

Bulgarujo: Jordan Trifonov Jordanov, Gara Dralfa, (19-j. studento) dez. kor. kun ges-anoj en ĉiuj landoj, pri diversaj temoj.

20-j. junulo deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Hristo Iv. Hristov, str. Sv. Kliment N-ro 124, Ĉirpan.

Ĉeĥoslovakujo: F-ino Jozefina Marečková, verkistino, orr. Skalica, Slov., dez. kor. k. verkistoj, pentristoj, skulptistoj, ĵurnalistoj.

Jaroslav Vidan, Hradčany 16, p. Tišnov, Mor. (studento) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.

Vojtech Majer, Hroznová Lhota 202, deziras korespondi.

12 gejunuloj, 16-19-j., anoj de la E-to-klubo en Jablonec, dez. kor. k. ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, interŝ. bildk. kaj poŝtm. Ili ankaŭ petas artikolojn por enpresigi en junularaj gazetoj. Respondo garantiata. Skribu al Miloslav Jíra, V. Nivách 19, Jablonec n. N.

Must Sláva Kelbler, Jemnice 602, Mor. deziras interŝanĝi lĉterojn kaj il. poŝtkartojn kun la tuta mondo. Respondo certa.

Germanujo: Heinz Hölzemann, Hans-Thoma-Str. 40, Bremen (instruisto de la angla, franca, latina kaj esperanta lingvo) serĉas korespondantojn.

Kurt Meyer (19-jara arkitekto), Parkstr. 99, Bremen, dez. kor.

Heinz Wiedefeld, Friedrich-Ebertstr. 108¹¹¹, Bremen, dez. kor.

21-j. instruisto, grupestro de la Libera Germana Junularo, volonte korespondos kun eksterlandaj samideanoj. G. Gerhardt, (15b) Greitz en Turingio, Hainbergstr. 68.

Hispanujo: K-do Giordano Moya Escayola, str. Pedrell 23, Tarrasa deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

K-do R. Sorolla, str. Torrente vidalet, 13, 1^o, -1^a, Barcelona, G. dez. interŝ. pm. k.ĉ.l. Resp. certa, se estas per let. rek: kaj zorge fermita.

Japanujo: 24-j. junulo, filatelisto, dez. interŝ. poŝtmarkojn kun nederlandano. S-ro Miyozzi Kazekami, Wada 1214, Wakayama-Si.

26-j. junulo dez. kor. kun nederlandano, i.a. pri moroj: s-ro Kuni Naruse, Kameoka, Kioto.

EN LA VERDA MONATO

Ĉiu vera esperantisto aĉetas libron, ĉu ne? Jen do bona okazo por subteni la **Libro-Servon** de nia Junularmovado!

Ĉi tie mankas la spaco por enpresigi vastan liston, sed ni povas perĉi por vi ĉiujn mendojn

Ni povas liveri ankaŭ belajn **bicikloflagetojn**. **Prezo 1.- guld.**

Plue ni havas novan stokon de **poŝtpapero** (nun pli praktikaj folioj).

Prezo: 50 kov. kaj 50 folioj: 2,— guld., plus afranko.

TJO-Libro-Servo, Voorhaven 80, Edam, Ned.

KURSGVIDANTOJ! Bonegan materialon vi trovas en la de **J. Muusses, Purmerend**, eldonitaj lernolibroj:

Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo” 0,50 gld.

Apartenanta vortlisto (speciale por nederlandanoj) **0,15 guld.**

„Sub la Verda Standardo” (plena metodo, konsistanta el: **Gvidilo** (nur por la gvidanto) ... **2,50 gld.**

„Laboriloj” I kaj II, po 0,90 „

„Memorigilo” „ 0,50 „

Mendu ĉe la TJO-Libroservo, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

Socikredito Savos La Mondon. Interesatoj mendu la broŝuron „Kio estas socikredito”, ĉe la Centra Adreso: **BM/TASK, London W.C. I, Anglujo.** (prezo 3 respondkuponoj).